

BULGARA ESPERANTISTO

Organo de Bulgara esperantista asocio

Rekomendita de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 1870 de 27. I. 1922.

Jarabono: 20 bulgaraj levoj, 1 svisa franko, 4 respondkuponoj aŭ egalvaloro.
Adreso: Poŝtkesto 233, SOFIA, Bulgarujo

Jaro XVI

Januaro-Februaro 1935

№ 5-6




Съ шейна край Самоковъ

Kun glitveturilo apud Samokov

**Зименъ
спортъ
въ България**

**Vintra
sporto
en Bulgarujo**



Скиоръ на Витоша

Skiisto sur Vitosha

Simpla opinio

Esperanto jam eniris sian 48 jaran aĝon, kaj se oni komparas ĝiajn statojn en diversaj fazoj de ĝia vivo, oni vidos, kiel mirinde, kiel multe ĝi progresis. Kaj se multaj el ni ne estus jam malnovaj amikoj kaj propagandistoj de tiu lingvo, ni certe konkludos, ke la venko estas sur la sojlo. Ĉu efektive, tiel estas? — Certe nel! Tamen, seniluziigi, estus malsaĝaĵo, ĉar, kiel ni diris pli supre (kaj ĉiu povas tion konstati), nenia internacia „idealaĵo“ tiel prosperis en tia mallonga periodo kiel nia lingva movado. La fina venka horo de Esp. estas tre, eĉ tro malproksima, tamen ni devas ĝin atendi kun tia stoicismo, kun kia iam la hebreoj atendis sian Mesion, kun kia la bravaj soldatoj post glora venko atendas la subskribon de la paco de la du militantaj partoj. Tiu venka horo venos tute nerimarkite, ĉar se ni diris, ke ni „atendu“, tio ne signifas stari kun la manoj krucigitaj, sed ni ĝin atendos *laborante* kaj kun la firma kredo je la fruktoj de nia laboro. Plene dependas de la esperantistoj,

tamen, ĉu ni plirapidigos la venkon de Esp., aŭ por longa tempo ankoraŭ malrapidigos ĝin. Ĉi tie ni aliĝas al aliaj esp. gazetoj kaj diras: oni ĉesu plu rilati al Esp. tro „sentimentale“ kiel al flataĵo. Esp. ne bezonas flatojn kaj flatajn esprimojn, sed severan uzon. Esp. ne plu estas tia lingvaĵo pri kiu oni devus dubi, ĉu ĝi estas taŭga, ĉu ĝi ne falus ktp. kaj ĝi bezonas nek mastrojn, nek patronojn . . . Ni devas taksi ĝin kiel ĉiujn aliajn lingvojn, pri kiuj oni aŭdis ĝis nun neniajn flataĵojn kaj neniu pretendis diri, ke li povus mastri la respektivan lingvon. Ni gardu la lingvon de Zamenhof pura, simpla, fleksebla. Ĉesu jam dikigi ĝian belan kaj facilan radikaron per nebezonaĵoj kaj nekompreneblaj neologismoj. Ni estu fundamentistoj de la fundamento ĝis la tegmento!

B. E.

„La lingvo internacia devas vivi, kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiaj estis ellaboritaj ĉiuj vivaj lingvoj.“

D-ro L. L. Zamenhof

Възпитанието въ нова Европа

Подъ това заглавие е излъзла на български книгата на Д-ръ Петъръ Петерсенъ, проф. по възпитание въ Данския университетъ, превелъ отъ нѣмски Д-ръ Б. Шоповъ, книгоиздателство „Слога“ — София.

Ето какво се пише на стр. 29-30 за есперанто:

„Понятни сж опититѣ и резултатитѣ отъ изкуственитѣ свѣтовни езици, особено отъ есперантото. На 22. септемврий 1922 год. Обществото на народитѣ призна въ едно пълно събрание съ 26 гласа срещу 2 есперантото като свѣтовенъ помощенъ езикъ. На XV свѣтовенъ конгресъ въ Нюрнбергъ (1923 г.) присѣтствуваха 5,000 участници отъ 43 държави. Първата учителска свѣтовна конференция въ Санъ Франциско (1923 г.) решила да се основе едно международно списание за учители по есперанто. Въ § 14

отъ своя уставъ международното педагогическо общество „Всехъ светихъ“ (съ седалище Флоренция) опредѣля за свой общъ езикъ латинския, а като помощенъ езикъ есперанто. Отъ 1. януарий 1925 год. есперанто е официаленъ езикъ за телеграми въ вжтрешността на Швейцария. Сжщо и въ Германия се устройватъ курсове по новия свѣтовенъ езикъ за пощенски чиновници, а въ Прусия споредъ наредбата отъ 10. мартъ 1924 година срѣднитѣ училища трѣбва да подържатъ обучението на есперанто. Съ есперанто си служатъ днесъ Интернационалното работническо бюро въ Женева, най-голѣмитѣ международни панаири, сдружения на международнитѣ общества, международния комитетъ на Червенъ кръсть, международното аптекарско сдружение, У. М. С. А., международния институтъ за биб-

лиография, франкмасонитѣ, добритѣ храмовници, Бѣлиятъ кръстѣ, Католическата църква, Международното бюро за мирѣ, Свѣтовниятѣ женски сѣюзѣ, Международната лига за защита на правата на народитѣ, Международната организация на пощенскитѣ и телеграфни чиновници и сѣюзѣтъ на пострадалитѣ отѣ войнитѣ. Свѣтовниятѣ сѣюзѣ на есперантиститѣ, който покрай идеалнитѣ обслужва и практически цели, поддърѣжа делегати въ повече отѣ 1000 голѣми градове въ 39 дърѣжави.

Покрай това все още изпѣква идеята единѣ отѣ живитѣ езици да стане общопризнатѣ международенѣ езикѣ, какѣвто преди повече отѣ сто години е билѣ френскиятѣ. Отѣ 1870 г. всѣки и въ дипломатическитѣ кръгове може да пише на своя езикѣ. Днесѣ, когато на прѣвъ планѣ стоятѣ всемирнитѣ икономически интереси, дреб-

нобурѣуазно капиталистическа Франция, въпрѣки всичкиятѣ си стремежѣ, далечѣ не играе ролята на англо-американскиятѣ свѣтъ и не е чудно, дето пакѣ изпѣква мисълѣта да се издигне до езикѣ за международно сношение английскиятѣ, като се установи добре фонетически. Въ всѣки случай много широки маси се интересуватѣ отѣ единѣ такѣвъ международенѣ езикѣ. Днесѣ вече не толкова ученитѣ, колкото търговскиятѣ свѣтъ. Тѣкмо въ търговскитѣ кръгове често е обмислянѣ единѣ единенѣ езикѣ за кореспонденция. Сѣщиятѣ интересѣ иматѣ международно обединенитѣ работни маси. И не е случайно, дето въ новитѣ училища има курсове по есперанто, а и работницитѣ изискватѣ такива и есперанто се въвежда сѣщо въ народнитѣ университети на всички страни. Международниятѣ сѣюзѣ на работническата младежѣ сѣщо си служи сѣ есперанто.

„B. E.“ gratulas siajn abonantojn kaj deziras al ili ĉian prosperon dum la kuranta jaro.

At. Duškov

LANTERNO

Lanternon putran pro ekzist',
silentstarantan ĉe la pord',
samkiel ĝiba pordgardist' —
kredeble, vi ekvidis ĝin jam.
Saluton ofte ĝi avizas
per sia muta kapo ftiza
al laboristoj kaj pordistoj,
ti-kiuj lacaj pro labor'
malfruvespere hejmen iras.
Malfortaj inoj preter ĝi
proponas sian amon jen,
kaj per ĉi tio penakiras
por nutri idojn per aven'...
Sed en atento kaj atendo
pasigas horojn la inar'.
Kaj ĉi ilia surda plendo

en la malvarmaj vintraj noktoj
ne atentigas iun ajn.

Kaj kiu haltus sur pavimo
kaj vokos ilin kaj animojn
per fid' plenigos kaj per am'?

De temp' al tempo detektiv',
ŝovinta ĉapon ĝis orel',
spionas lerte, kiel kato
marŝante en timplena stato,
en la okuloj kun soif', —
bestece kaj kun fi-koler'
atakas rabe li viktimon
ĉe la kaduka jam lantern'.

El la „Nova Antologio“
de I. H. K.

At. Duškov

Pasinteco

Mi kreskis ĉe kampoj serenaj, ĉe freŝaj kaj klaraj torentoj,
 infan' de popol-instruisto, rigardon vualis ĝoj-sento.
 La rosaj herbejoj, arbaĵoj, grenkampoj kaj ĉarmaj kaj oraj
 renkontis min ĉiumatene, vespere kun kantoj sonoraj.
 Taŭzita, ĉifona, kun rozaj piedoj saltetis mi vage
 kaj vadis la kampajn marĉetojn kaj lavis vizaĝon tuttage.
 Mi treme kaj spirodetene aŭskultis de l'vento eternan fluŝradon,
 l'antikvan fabelon de l'pino kaj bluan ĉielan ridadon.
 Ĉirkaŭe ĉirpatis birdetoj kaj najtingaletoj adoraj,
 kaj kanto ilia en mia animo sonoras ankoraŭ.
 Ĉiel' min aspergis subtile per perlaj da freŝo gutetoj
 kaj steloj min kovris per la diafanaj kaj brilaj silk-retoj.
 Ho, tagoj pasintaj por ĉiam, pasintaj infanaj vi jaroj,
 redonu al mi la mildecon, land'-mian kun vastaj arbaĵoj.
 Redonu al mi liberecon infanan kaj ridon sonoratan,
 kun kiuj renkontis aŭroron mi kaj la ter-mankojn dolorajn!...

El la „Nova Antologio“ de I. H. K.

Kristnaska antaŭvespero

de Diana D-va

Din, din, din...

Argentaj sonoriloj tintas... facile glitas
 glitveturiloj, venas kaj forpasas sur la
 blanka vojo...

Silente, silente, silente... kvazaŭ la
 tempo estas ĉesinta sian iron. Mi ne
 scias por kioma fojo oni incensas per
 timiano la tradicion manĝotablon. La
 ŝtupo tradicia bruletas kaj forbrulas. Ĝi
 disŝetas molan, orsimilan lumon. Tra la
 grizaj nubetoj de l'timiano, tra l'aromo
 de l'mirho — la animo humile ekiras.
 Ĝi iras supren tra centjaroj kaj ven-
 tegoj de l'tempo kaj kun granda pieco
 ekstaras antaŭ la stelo gvidanta.

Tie supre, antaŭ la pensema Patrino,
 malgranda flameto lumas...

Ni maldormas!

Kristo naskiĝas, naskiĝas la Dihomo!

Sonorilegoj laŭte sonas kaj la ĝojiga
 novaĵo aŭdiĝas! Li naskiĝis, Li naskiĝis...
 Saluton!...

Tio ĉi ripetiĝas, ĉiam la sama, ĉiu-
 jare!

Li naskiĝas por esti krucumita, Li
 naskiĝas, Li mortas, tradicio de l'cent-
 j.

Ĉu Li naskiĝas ankaŭ ĉe ni? Ĉu ni
 renoviĝas per Li? Ĉu ni apenaŭ nun
 kontrolas nian konsciencon por esti
 trankvilaj kaj vere feliĉaj, se ni estas
 honestaj, puraj, belaj aŭ apenaŭ bonaj
 homoj?

Ĝu ni apenaŭ nun kontrolas nian
 esencon kaj Lin, tiom kiom Li povas
 ekzisti en ni? Aŭ eble ni vivas trank-
 vile, estante samtempe mortigintaj aŭ dis-
 ŝirintaj ies vivon, forrabintaj aŭ konda-
 mnintaj iun je neaŭditaj suferoj; eble ni
 estas surdaj kaj mutaj al la malfeliĉuloj...
 Estas moralaj intereso kaj respondecoj
 antaŭ la leĝoj neskribitaj de l'homaro,
 kiujn ni ofte forgesas, tial ni estas kul-
 paj pri la plej grandaj malbonoj kaj mal-
 feliĉoj. Pasinteco, nuneco, estonteco —
 ŝtupoj de l'homa vivo tra kiuj homo
 ŝanĝiĝas, sed li en sia esenco devas
 resti unusama, nevenkebla kun konstanta
 emo al Li — al la plej bela, la plej
 perfekta — La Dihomo!

Saluton! Kristo naskiĝis!

Trad.: P. Jordanov

PENSOJ

La plej multekosta heredaĵo., kiun povas gepatroj lasi al siaj infanoj, estas memoro pri pura, pacama geedza vivo.

* Pli bone estas ami ĉion, kion ni havas, ol havi ĉion, kion ni amas.

* La sekreto de la arto vivi kuŝas nur en la adaptiĝo al la cirkonstancoj.

* Nur homo, troviĝanta sur la plej alta ŝtupo de disvolvo, ne trouzas sian

potencon kaj liberon.

* Se vi volas esti feliĉa en via vivo, helpu la fremdan feliĉon, ĉar la ĝojo, kiun ni kaŭzas, feliĉigas nin.

* Estu kun la saĝuloj saĝa kaj kun la stultuloj stulta kaj vi havos ĉiam la aprobon de la publiko.

I. H. K.

Al la rivero de la nimfeoj*)

Nia motorboato „Albatroso“ forlasis la golfon de Burgas kaj eknaĝis suden al Ropotamo aŭ Careva-reka — la rivero de la nimfeoj. La ondoj de Nigra maro balancegis la boaton. „Albatroso“ ne timis ilin. Kuraĝe ĝi tranĉis ilin, gracie kaj impete ĝi flugis. Tra nuboj vojaĝis la suno. La vento flirtigis la hararon de mia bluokula kunekskursantino.

Post tri horoj ni komencis proksimiĝi al la enfluejo de Ropotamo. Inter plaĝo kaj roka mara bordo ĝi troviĝis. Verda bosko kronis la rokan bordon. Sur ĝi floris papavoj kaj cejanoj. Taĉmentoj da ondoj atakis la bordon. Ŝaŭmeroj forsaltis kaj aspergis la florojn. La floroj fleksiĝis konsternitaj. Super ili la bosko lamentis. „Albatroso“ transpasis la enfluejon kaj ĝi trankviliĝis. Kontraŭ la fluo ni naĝis, sed la akvo apenaŭ fluis, kvazaŭ la maro kaj rivero ne kisis sin. Dum la maro furiozis, sur la supraĵo de Ropotamo spegulis la masoj da nuboj kaj la arbaro, kovranta la dekstran bordon. Nia boato rompadis la subakvan ensorĉan pejzaĝon. La rivero sulkiĝis. La kano, borderanta la du bordojn, moviĝis kaj susuris. Timigitaj birdetoj elflugis. Laŭ la maldekstra bordo marŝis rubando da arboj. Trans ĝi la bordo tuj altiĝis kaj prezentis sablan dezerton. Sur la kresto de bordo, sur la horizonto, kreskis aliaj arboj. Meze de la verda maja arbaro la flava dezerto de Ropotamo kontrastis strange.

La bordoj celis konverĝi. Tra riverkurbiĝoj ni glitis. La feino naturo malkovris al ni admirindajn pejzaĝojn. Hedero kaj lianoj volvis la arbojn, la bran-

ĉoj interplektiĝis kaj formis arkojn, klemato kaj dornarbetaĵoj zonis kaj ligis ilin. Giganta leono surprizis nin: amaso da grandegaj rokoj sur la dekstra bordo similis al leona kapo. La motoro taktis rapidege. La bordoj kuris preter ni . . . Mi rigardis mian kunekskursantinon. Ni mutis, sed niaj okuloj lumis kaj parolis, ke en ekstazo kaj triumfo niaj koroj pulsas... Subite la boato komencis dekstreniĝi. Ho! Mi forgesis la boatiston. Li movis la direktilon. „Sed kie estas la nimfeoj?“ — „Ankoraŭ ili ne floras. Dum ĝi tiu printempo tre pluvas. La nimfeoj



*) Akvolilioj. Red.



ŝatas multe da suno. Venu somere!*, klarigis la boatisto.

En la fiŝkaptista urbo Sozopol mi pasigis la someron. Dum aŭgusto frumatene mi piediris al Ropotamo. Mia kunekskursintino forestis. Subtila vento karegis la maron, majeste la suno aperis kaj abunde surverŝis ĝin per oro kaj arĝento. Tra longaj plaĝoj mi paŝadis. Kvin horoj elfluis. Mi atingis la dezerton de Ropotamo. Jam alte la suno blilis, la maro lazuris kiel la pupiloj de mia kunekskursintino. Mi malsupreniris al la rivero. Mi penis marŝi laŭ la bordando mem, ĉar mi ne sciis, ĝuste kie floris la nimfeoj. Altega herbo malhelpis al mi. Antaŭ mi etendiĝis kanejoj, en ŝlimon dronis miaj piedoj. Mi devis marŝi ree, serpentumi kaj zigzagi. Mi ĉesis rigardi la riveron. Ĝi fluis sen almenaŭ iomete plaŭdi por atesti, ke ĝi ekzistis. Multfoje en la densan herbon mi enŝoviĝis, per brakoj mi faris al mi vojon, dornarbustoj pikis kaj skrapis min ĝin sango. Mi retrovis la riveron, sed kiel ŝaluza patrino ankoraŭ ĝi kaŝis siajn infanojn — ankoraŭ mi ne vidis la nimfeojn. Denove mi provis ne perdi ĝin, sed novaj kanejoj kaj ŝlimejoj puŝis min for de ĝi. Pli obstine mi revenadis al ĝi. Mi rememoris pri „Albatroso“. Ĝis difinita loko, nur kvar aŭ kvin kilometroj de la enfluejo ĝi povus flugi. Tie, tre malproksime de la maro, la rivero malprofundiĝis, kaj en ĝi putris falintaj arboj. Unu el ili kunligis la bordojn kiel ponto. Mi ekpaŝis

sur la dekstra bordo. Preskaŭ malaperis la kano. Tra bela arbaro mi marŝis kun koro batanta. Jam mi vidis foliojn de nimfeoj. Post riverkurbiĝo ekblankis unu nimfeo. Mi saltis al ĝi. Sur la malhela akvo en la tagmezaj sunradioj ĝiaj petaloj blankis kiel pura monta neĝo. Mi kliniĝis. Delikate kaj ame miaj lipoj tuŝis la nimfeon.

Mi marŝis plu kaj renkontis paŝtiston. Li konsideris min frenezulo, ĉar mi serĉis la florojn. Li diris al mi, ke la nimfeoj ne kreskis en la rivero mem, sed en lago apud ĝi, ke la lago troviĝis sur la maldekstra bordo, ke arbaro ĉirkaŭigis ĝin.

Longe mi vagis returnen. Ĵus mi estis forpasonta herbejon kaj enironta arbaron, mi rimarkis je kelkaj dekoj da metroj flanke de mi mallarĝan enirejon por la arbaro kaj malsupre, inter la arbotrunkoj, freŝverdan foliaron. La somera suno estis flaviginta la printempan tualeton de la naturo. Nur la folioj de la nimfeoj estis junaj. Sur la lago naĝis tapiŝoj da ili. Ili brilis kaj reflektis la sunradiojn. Ĉarmaj nimfeoj banis sin. Mi ĵetis la tornistron kaj en la lagon mi penetris por ĝui ilin. Ili estis ravaj kaj puraj kiel fabelbelaj virgulinoj.

Proksime de la maro kaj ĉe la dezerto, sur la maldekstra bordo de Ropotamo, ŝprucis glacimalvarma fonto. Tie mi trovis grupon da turistoj. Per ilia boato mi eliris el la rivero. La maro estis trankvila kaj cindrogriza. Delfenoj ludis. lilaj dorsoj brilis kiel ŝtalo.

Mihail D. Georgiev



Ŝanzo apud Samokov

Iv. H. Krestanov.

Fragmentoj*)

el „Tra Eŭropo per Esperanto“

(Vojaĝnotoj kaj impresoj)

I

AL LA LANDO DE MIAJ REVOJ

La vintra packonferenco en Londono 1912 faris nenion bonan por la paco, kaj la Balkana milito rekomenciĝis. Nun oni devis batali por la plezuro de „kultura, kristana ktp.“ Eŭropo. Ĉiuokaze mi ne plu estis bezona al la milito kaj por ne perdi la karan tempon en vana atendado — ĉar la Sofia universitato kaj ĉio, kio ne havas rilaton kun la milito, estas fermita — i pretigis miajn valizojn por forveturi okcidenten, daŭrigi miajn studadojn.

La kultura Eŭropo min tiris, logis min jam de infaneco kaj precipe ĝia fokuso — Francujo, la lando de miaj revoj. Mi do estis firme decidinta iri tien, vidi homojn, ellerni lingvon, renovigi mian animon. Ĝis nun mi banis min en la espero — tiu subtenantino de ĉiuj suferantoj — realigi miajn revojn kaj jen hodiaŭ venis la multatendata momento. Mi jam estis preta fari tion, kio al multaj ŝajnas nebla, kvankam en ili ankaŭ brulas la malhela sopiro al fremdaj landoj, al la malproksimeco, kaj al ili mi rakontados.

*

Jam delonge mi korespondis — kompreneble en la lingvo de l'espero — kun s-ro Boirac, rektoro, kaj s-ro Lambert, profesoro de la Diĵona universitato. Kvankam iliaj respondoj estis ĉiam tre favoraj, mi reskribis al mia malnova korespondantino, s-ino Henriette-Nolotte, kaj mi ricevis tiel afablan respondon, ke mi ne plu ŝanceliĝis akcepti Diĵon'on kiel mian estontan studlokon. Interalie ŝi tre amike skribis al mi: „...Mi estos ĝoja renkonti vin ĉe la stacidomo...“ Mi do ekiris kun la sankta signo de l'espero, ne forgesinte

*)Ni publikigos kelkajn eltirajhojn (pri Francujo, Anglujo kaj Bulgarujo) el la lasta presopreta ilustrita verko — la „cigna kanto“ de nia redaktoro.

la Jarlibron de UEA, kies servojn nun mi ankaŭ devis gustumi.

Ĉe la Sofia stacidomo. Marto 1913. Estis frua lunda mateno. Nenia eksterordinara bruoj, la lampetoj apenaŭ lumetis trans la nebulo, la neĝo malrapide faladis, kaj la tremanta koro atendis la trifojan signalon por forveturo.

Sonorado... La vagonaro jam moviĝas. Adiaŭ! Adiaŭ! Kaj ĝis revido! Stariginta apud la fenestro, mi streĉas la okulojn al miaj parencoj kaj amikoj, al Sofia — ĉio malantaŭe estas jam memoro...

Miaj kunvojaĝantoj estis precipe serbaj soldatoj kaj oficiroj, revenantaj por kelkaj tagoj al siaj hejmoj. Inter ni komenciĝis disputado pri la „malbono de l'tago“. La aferoj estas konataj, kaj mi ne volas priskribi ilian terurecon. Nur kiam miaj serbaj kunfratoj komencis pasie fanfaroni, mi nevole rememoris antaŭnelonge legitan artikolon de franca eminentulo s-ro Dantec, kaj al mi ŝajnas, ke li estas prava dirante, ke eterna paco ne povas ekzisti. Ĝi nur provizore povas daŭri ĝis kiam la komuna malamiko estos venkita. Al mi ekŝajnis nun, ke la Balkana ligo ankaŭ estis nur provizora... la ceteron mi ne volis pensi — ĝin montros la tempo.

Kiam en la malproksimo ekbrilis la perono de la Caribrod'a stacidomo kaj i ekpensis, ke nur post tri kilometroj troviĝas la landlimo, mia koro denove fleksiĝis, kaj min ekregas granda, premanta nostalgio al Sofia kaj Bulgarujo. Adiaŭ, adiaŭ, kara patrolando, mi vin lasas kun la espero vin revidi!

Post revizio de l'pasporto — ĉion oni severe observis — la vagonaro ŝanĝis sian bulgaran uniformon kaj denove ekflugas, nun jam sur la serba tero. Mi enprofundiĝas en memorojn. Ĝuste antaŭ 4 jaroj mi kun konata rusa samideano, s-ro Evstiféieff, vojaĝis kun propaganda celo sur tiu ĉi sama vojo. La pasintan jaron mi ĝin pasis duan fojon kun samlandano irante al lu „Oka“ en Krakovo. Tiam

estis tiel pace, tiel trankvile. Mi rememoris nian infanan kredon en la bono...

— — — — —
 Traka — traka... Pfu — pfu... La radoj grincas, kaj la vagonaro flugas kun la revoj ĉiam antaŭen... Mi traveturas Serbujon, Aŭstrujon, Bavarujojn, Svisujon. Komprenoble ĉie mi haltis kaj ĝuis neforgeseblajn tagojn... Dio, kiel afablaj kaj servemaj estas la geesperantistoj: mi jam ne bezonas kuri sola kaj pene demandi klarigojn pri forveturo k. c. La lampo de Aladeno ne povus helpi al mi pli ol la verda steleto.

Kaj veturante jam al la celo de mia vojaĝo, maŝinsimile traflugis en mi la tre pravaj vortoj de nia eminenta samideano Privat diranta, ke antaŭpostenoj de la novfondita regno „Esperantujo“ jam estas starigitaj; ke bonaj amikoj jam deĵoras sur la vojo tra la vasta mondo.

Ekstere jam plene tagiĝis. La vagonaro denove ruliĝas sur la glata vojo, tamen kvazaŭ por inciti mian senpaciencon, ĝi, ŝajnas al mi, ne tiel rapidas. Fine ni trapasas la landlimon. — Delle, tout le monde descend!...

Jen la unua franca stacidomo. Mi aŭdas la belsonon de l'franca lingvo kaj sentas la sploron de l'franca aero. Jam finiĝis. Mi malsupreniras, kaj post revizio, atendante la vagonaron, mia scivolemo min puŝas al la urbeto. Jen, mi estas en Francujo, trakuras en mia kapo legante la franclingvajn surskribaĵojn. Kia ĝojo plenigas mian batantan koron, mi kvazaŭ renaskiĝas.

La formoj denove ŝanĝiĝas, la vagono subite pleniĝas je francaj vortoj kaj ŝercoj — pli kutimaj, pli proksimaj, pli konataj, kaj la vagonaro furioze flugas. Ĝi pasas preter malriĉaj kaj nebelaj loĝlokoj. Ĉe la penso, ke nur post kelkaj horoj mi estos en Diĵono — la celo de mia vojaĝo — mia koro tremas... Diĵono!... Kiel klare aperas nun en mia memoro la leciono de literaturo, kiam en la gimnazio nia profesoro rakontadis al ni pri la filozofo Jean Jacques Rousseau, kronita de la Diĵona akademio... Tien, tien mi iras, mi ĝin vidos — tiun faman akademion.

Ne granda halto ĉe la Besançon'a stacidomo, kie la vagonaro prenas novajn

pasaĝerojn, rememorigas al mi pri la tie ĉi naskita literaturkoloso Victor Hugo. Tie ĉi mi akiris novan kunvojaĝanton: francan sinjorinon, revenantan el Germanujo kaj celantan ankaŭ Diĵon'on. Mi profitis la okazon praktiki miajn lingvajn konojn kaj mi komencis agrablan interparolon, kies finiĝo devis esti — kiel ĉiam — la propagando de nia „kara...“

De tempo al tempo videtiĝas ekstere iu granda blua reklamo kaj kelkaj vilaĝetoj kaj urbetoj. Kaj denove la furioza kurego de l'vagonaro, la griza ĉielo kaj en la animo ia alarmo, kaj timo, kaj malĝojo, kiel ĉiu atendata fino.

Ni ĉiam flugas. Fine, en la malproksimo malkovriĝas neelrigardebla vasteco de tegmentoj, la suno ekridetas desur la heliĝinta jam ĉielo, kaj la lokomotivo longe fajfas, la vagonaro serpentumas inter aliaj vagonoj de ambaŭ flankoj.

Diĵon. La vagonaro malrapide eniras en la urban stacidomon, kie min atendas tiom da konataj nekonataĵoj. Jen, vera ĝojo, mi tuj ekvidas mian korespondantinon, atendantan ĉe la elirejo. Mi ŝin tuj rekonas, laŭ la antaŭsendita fotografaĵo, kaj mi kuras al ŝi respekto-plene.

— Bonan tagon, sinjorino!... kaj mi elparolas aron da vortoj...

— Malrapide, malrapide, mi petas. Mi ne estas lerta esperantistino, respondas ŝi modeste kaj kiel pli aĝa fratino min kondukas al la stacidoma konservejo, kie mi deponas miajn valizojn. Poste ŝi kondukas min al la sekretario de la Protekta komitato de fremdlandaj studentoj, kie mi prezentas min kaj ricevas kelkajn paperaĵojn. Nun mi estas direktata al s-ro prof. Lambert, dekano de la filologia fakultato kaj konata malnova samideano, kunfondinto de „Esperanto“. Mi estis mirigata de la tre granda afableco, per kiu li akceptis nin kaj informis min pri kelkaj utilaj aferoj. Fine, ni ekmarŝis al la loĝejo de mia korespondantino...

Tuta kastelo estas ĝi, proksime de la urba teatro kaj de la universitato. Tie ŝi prezentas min al sia patrino, s-ino Nolotte, kaj al sia fratino f-ino Françoise. Ilia rimarko estis prava: mi venis en Francujon por lerni pli bone la francan, kaj

tion mi atingos nur se mi parolos ĝin. Kaj „noblesse obligel“ mi devis paroli france.

Baldaŭ mi certiĝis, ke lerni fremdan lingvon en libro kaj lerni ĝin en la vivo estas du diversaj aferoj. Jen la pruvo:

La afabla familio invitis min veni morgaŭ, Palmofestan dimanĉon, „pour prendre le déjeuner“... Pro tio, reveninte en la hotelo, mi petis la serviston vekti min frumatene. Je la 8-a h. m. mi jam estas antaŭ la pordego de la kastelo. Mi tiras la ŝnuron. Eksoniĝas. Aperas la servistino. Mi eniras... Min akceptas mia korespondantino. Mi rimarkas ian miron sur ŝia vizaĝo. Tio ĉi mirigas min... „Eble mi venis iom malfrue!“... Ŝia patrino kaj fratino, tamen, estis en preĝejo. En la salono ni interparolas pri la balkana milito, pri bulgaraj kaj turkaj moroj, mi montras bildojn de mia lando ktp. Pasas unu horo, pasas du, tri... Estas jam la 11-a antaŭtagmeze. Miaj intestoj komencas laŭtiĝi, protesti, postuli sian rajton. Mi senkulpiĝas kaj volas reveni al mia hotelo...

— Restu, restu, sinjoro, la miaj baldaŭ revenos kaj ni tuj poste prenos „le déjeuner“...

— Sed, kara sinjorino, tio ĉi jam estos „le dîner“, diras mi.

— Ho ne, ni prenas „le dîner“ je la 7-a h. vespere.

— Sed je tiu ĉi vespera horo oni prenas „le souper“.

— Tute ne, „le souper“ estas prenata post la 11-a vespere, „après le théâtre“.

— Sed, je Dio, kiel do vi nomas la matenmanĝon?!...

— Ha, „c'est le petit déjeuner!“

Ĝis nun mi ne sciis tion. Kaj mi restis, ĉar alie mi estus perdinta bonan tagmanĝon t. e. „déjeuner“, kiun mi, laŭ la lernolibroj kaj vortaroj, tradukis „matenmanĝon“.

Poste mi eksciis, ke ĉi tie oni havas ankaŭ „goûter“ je la 2-a h. kaj „five o'clock tea“ je la 5-a h. posttagmeze.

— — — — —

Post kelkaj tagoj mi ĉeestas Esp. kunvenojn, dum kiuj mi havas la plezuron konatiĝi kun la Diĵona geesperantistaro. Neniam mi forgesos la afablan akcepton en la familioj de s-ro rektoro Boirac, de komandanto Bastoul kaj de aliaj eminentuloj, kun kiuj mi plurfoje parolis en nia kara lingvo. Mi estas kelkfoje invitita fari publikajn paroladojn pri „La Balkana milito“, kaj mi tre admiris la francajn scivolemon, interesiĝon, simpatian. La loka gazetaro favore raportis. En proksimaj urboj oni legis ĝin. Ankaŭ de tie oni invitis min... kaj tiele mi baldaŭ traveturis la tutan landon de miaj revoj — j'ai fait mon tour de France.

Ĉiuj estis tiel afablaj, ke fine mi komencis timi, ke baldaŭ elĉerpiĝos la provizo de miaj dankoj. Nun mi klare revidas la veran esperantan senton, kiu regas kaj kunigas la esperantistojn. Oni diru, kion oni volas pri Esperanto, sed ni ja restos ĉiam plej grandaj kaj fervoraj defendantoj de nia kara, nobla, kunfratiga afero!

Esperantismo ne estas vana vorto!

Въ днешно време повече отъ всѣкога, не подлежи на съмнение настоячивата необходимостъ отъ взаимно уважение на всички народи на земята и взаимното имъ разбирање.


Ще бжде достатъчно, ако нѣкое правителство се реши съ помощта на интернационалниятъ комитетъ да въведе есперанто като задължителенъ предметъ за обучение въ училищата.

На изтокъ, дето Вавилонската кула е много по-висока отъ другаде, увеждањето на меѓународенъ езикъ, като есперанто, би било много голѣмо благодеење и би могло, за благо на всички, да се въведе и въ училищата като езикъ за взаимно разбирање.

Августъ Форелъ.

Kiel mi farigis esperantisto

Mi konatiĝis kun esperanto en apudmara urbo Varna dum 1899. Tiam mi estis en sesa gimnazia klaso. En bela tago dum tiu jaro mia kunlerninto kaj amiko s-ro Stefan Dečev donis senpage al mi broŝureton de Kr. Mirski (tiam advokato kaj parlamentano), titolita „Mal-longaj informoj pri la internacia lingvo



Georgi Atanasov

Esperanto“. Tie mi trovis tri leterojn, kiujn mi devis traduki en bulgaran lingvon kaj sendi al la aŭtoro de esperanto kune kun la peto pri pluaj informoj. Responde mi ricevis la adresaron de la esperantistoj, en kiu mi estis jam enskribita sub № 5204, kaj la internacian vortaron en ses lingvoj de D-ro L. Zamenhof. Mia ĝojo estis senfina. Mi povis nun korespondi kun miloj da samideanoj sur la tuta terglobo kaj tiamaniere min senti kiel frato kun ĉiuj. La ideo, kunfratigo de la popoloj, kiun esperanto ĉefe celas, entuziasmigis min tro multe kaj mi decidis uzi ĉiujn miajn fortojn por la disvastigo de esperanto, unu el la plej potencaj rimedoj por interkompreniĝo de la popoloj kaj sekve la ekregado de la eterna paco. Interfratiĝo de la popoloj kaj la forigo de la milito por ĉiam, tiuj ĉi du ideoj okupis min jam de infana aĝo kaj min ne forlasis la espero, ke venos la tago, kiam

la amo inter la popoloj efektiviĝos. Jen kial kun granda, senfina ĝojo mi ĉirkaŭprenis esperanton kun ĝia altnobla celo. Kun la malgranda vortareto, kiun mi trovis en la broŝureto suprecitita, mi ekiris kun entuziasmo antaŭen. Mi komencis korespondadi. Baldaŭ aperis la „manokonduko“ de G. Oreškov kaj Hr. Popov kaj per la helpo de la bulgar-esperanta vortaro, troviĝinta tie, mi plifortigis la korespondadon kun eksterlandaj esperantistoj kaj post sesmonata korespondado mi sentis min jam sufiĉe sperta esperantisto: mi kuraĝis traduki bulgarajn rakontojn en esperanton. Fininte la gimnazian kurson, mi devis translokiĝi en Plovdiv'on pro la forto de la cirkonstancoj. Tie, en Plovdiv, mi konatiĝis kun s-ro Oreškov, aliĝis al la anoj de la klubo „Stelo“ kaj kune ni entreprenis la eldonadon de „Rondiranto“. En tiu tempo en Francujo estis aranĝita konkurso de literaturaj tradukoj. Mi partoprenis la konkurson per la rakonto de Iv. Vazov „Avo Joco rigardas“ kaj mi gajnis la trian premion. Tiu ĉi fakto min kuraĝigis tre multe kaj mi akceptis redaktadi „Rondiranton“. S-ro Oreškov prenis la administradon de la gazeto. Kompreneble, ni helpis unu la alian en nia laboro por ke la afero iru bone kaj regule. Do, mi kaj s-ro Oreškov estis la „Speciala komitato“, kiu redaktis kaj administris „Rondiranton“ . . . La vortoj „Speciala komitato“ bone sonis al niaj legintoj kaj, kaŝitaj post tiu ĉi nomo, ni nin sentis pli trankvilaj en nia laboro. La apero de „Rondiranto“ antaŭenigis nian aferon en Bulgarujo kaj parte en Plovdiv, kaj mi gvidis kelkajn esperantajjn kursojn, unu el kiuj estis gvidata sur la monteto „Bunargik“, sur la verda herbo . . . Post du jaroj mi translokiĝis en Burgas'on. Tie mi ankaŭ gvidis 2 kursojn dum mia sesmonata loĝado kaj poste mi devis translokiĝi en Varna'n, kie ni, kelkaj fervoraj samideanoj, fondis la esp. grupon „Frateco“. La parlamentano s-ro Kr. Mirski akceptis esti honora prezidanto de la grupo. Tie mi ankaŭ gvi-

Есперантски новини

(Esperanto-novaĵoj)

„Романъ-библиотека“ на есп. възнамѣрява да издаде холандската печатница „Helmond“. Всѣки месецъ ще излизатъ 200 стр., абонаментъ за 6 романи 6 шв. франка + 1.20 шв. фр. за пощ. разноси. Първото съчинение е „Blua Lago“ отъ Willy Wood.

Международниятъ Че-Институтъ на Есперанто въ Холандия е избралъ за свой кореспондентъ-преподавателъ въ България нашия редакторъ г. Кръстановъ.

Нашитѣ югославянски събратя сж почнали да работятъ за разпространението на есп. между лѣкаритѣ тамъ. Може би добриятъ примѣръ на въвелия есп. резюмета загребски „Лѣкарски вестникъ“ да намѣри нови адепти за подобрието на международнитѣ сношения посрѣдствомъ мощния езикъ на Заменхофъ, който бѣ незабравимъ лѣкаръ и човѣколюбивъ идеалистъ.

Есп. въ науката. Ученитѣ и техницитѣ все повече и повече ценятъ и употрѣбаватъ есп. Това се вижда отъ резюмирането и писането на научни статии на есп. Така практикуватъ „Френскиятъ електрически прегледъ“ „Бразилскиятъ географически бюлетинъ“ и нѣколко японски издания.

Голѣмиятъ илюстриранъ вестникъ „European Herald“, 110, Fleet Street, London, E. C. 4., който се списва на

dis kelkajn kursojn ĝis kiam mi forveturis al Prago por studi muzikarton. Dum tiu kvarjara agado mi tradukis la „Unuajn lecionojn“ de Cart, la broŝureton de L. de Beaufront „La ideo pri lingvo internacia“, la esperantan gramatikon kaj vortaron en formo de kalendaro, „Esperanton en dek lecionoj“ (kun s-ro T. Kanjev) kaj „Universalan vortaron“ (kun S-ro G. Oreškov).

Georgi Atanasov

(muzikisto, str. Tetevenska, 64, Sofia)

англ., нѣмски, френски, испански и италиански, е въвелъ 2 страници и на есперанто, озаглавени „La Monda Spegulo“ и „Esperantista Kroniko“. Моли за сътрудници.

Медицинскитѣ списания „La Medicina catalana“ въ Барселона, „Bulletin de la Société Belge d'Orthopédie“ въ Укле и „Journal de Médecine“ въ Лионъ даватъ напоследъкъ есп. резюмета на по-важнитѣ статии.

Международниятъ полицейски съюзъ отъ една година е регистриралъ голѣми успѣхи. Благодарение на списанието „Internacia Polica Bulteno“ полицаитѣ се групиратъ и работятъ на практичното поле, а официалнитѣ кржгове ставатъ все по-благосклонни.

Чарлсъ-Дикенсовото съчинение „Животътъ на Господа Нашего Исуса“, писано въ 1849 г., е издадено на есп. отъ „The Esperanto Publishing Company Limited“ въ Лондонъ. Книгата е една отъ най-хубавитѣ, излѣзли до сега на есп. — на луксозна хартия, съ картини отъ прочути художници, като Рафаелъ, Леонардо да Винчи и др.

Естонското туристическо списание „Turismi Teataja“, което отъ нѣколко време посвещава цѣла страница на есп., сега прибавя подъ всѣка илюстрация и есперантско обяснение.

Британскиятъ есп. съюзъ си има собственъ автомобилъ, изминалъ до сега стотини хиляди километри. Той носи пропагандически текстъ и се е показалъ много полезенъ. Миналата година е посетилъ 119 есп. събрания въ цѣлата страна.

Лайпцигскиятъ панаиръ продължава да издава проспекти на есп. Той става ежегодно по два пжти: на пролѣтъ почва отъ началото на мартъ и на есень — отъ края на августъ. Отнесете се до: Leipzig Messamt Germ.

Лионският панаир е издалъ красиви пропагандични афиши на есп. Адресъ: Foire de Lyon France.

XII Международен лагер на скаутския есп. съюз, организиранъ отъ Есперантския отдѣлъ на Центъра на словашкитѣ католишки скаути върху Кордики при Банска Бистрица (Чехословакия), е траялъ отъ 16. до 31. юлий т. г. Присъжтствували сж 85 скаути — есперантисти отъ различни народности. Имало е и девически лагеръ при Тайовъ съ 35 скаутки и други съ 22, а всичко въ кадритѣ на лагера на XII международен лагеръ имало 142 скаути и скаутки. Всички сж прекарали много хубаво въ братска срѣда срѣдъ чудна природа.

Мексиканското списание „Renovacion“ за опростяване правописа е въвело есперантски отдѣлъ. Сжщото е сторило и индокитайското списание „L' Annam Nouveau“.

Бразилската поща е издала нова

серия официални пощенски карти съ есп. текстъ. Сжщата сега употрѣбява официаленъ печатъ съ следния еспер. текстъ: Rio de Janeiro, turisma urbo.

Българският лѣкаръ Д-ръ Ник. С. Кирчевъ, напустналъ България преди 35 год., обиколилъ Азия и отъ 12 год. въ Хонолулу — е започналъ да изучава есперанто въ своята 69 г. възраст. Чувствувалъ се още момче въ райскитѣ Хавайски острови, дето било вѣчна пролѣтъ.

Езицитѣ въ свѣта. Ако хората, които днесъ говорятъ на 860 езика и на 5000 диалекта, биха били събрани наедно, би се получила такава бъркотия, за която се разправя въ Библията. Въ Европа се говорятъ 88 езика, въ Азия — 123, въ Африка — 114, въ Америка — 117 и въ островитѣ на Великия океанъ — 417. Ето още едно доказателство за нуждата отъ есперанто.

Nia vivo

(alilandaj gazetoj estas petataj represi)

Sofia. — La 15. dec. okaze de la „Verda semajno“ (13—20. dec.) kaj de la naskiĝtago de la Majstro, nia vicprez. s-ro Krestanov faris antaŭ la mikrofono de „Radio-Sofia“ apologian paroladon pri „Dro Zamenhof kaj lia verko“. Granda sukceso — alvenis multaj gratuloj.

— Depost Novjaro la Sofiaj geesperantistoj kunvenas ĉiumerkrede 6¹/₂—7¹/₂ h. v. en la saloneto de la bozavendejo „Edelvajs“ bulvaro Dondukov.

— La 23. jan. s-ro Oktomvrijski radioparolis en есп. pri „La lando de la lernemuloj“.

Bansko, Razlojko. S-ro Dim. Stojanov malfermis kurson kun 10 p.

v. Boboŝevo, Dupniŝko. La abstinenca societo „Nova vivo“ aranĝas de 15. XII. 1934 ĝis 15. III. 1935 есп. kurson por gevilaĝanoj. Ĝi vekas vivan interreson inter gejunuloj. La kurso estas gvidata de M. Langov.

v. Glojene, Oreĥvsko. Formiĝis societo. Kurso kun 15 p.

Kirĝali. Societo „Stelo“ elektis estraron: prez. s-ro inĝ. Trikjakin, vicprez. Nedelĉo Kirjanov, sekr. Simeon Petrov, kas. Aleks. Haĝi Jordanov, membro — kons. Valĉo Delĉev, kontr. kom.: L. Kánev, Ivanka Slavkova kaj M. Zahariev

Pazarĝik. La societo aranĝis publikan kunvenon okaze de la „Verda semajno“. Paroladis la sekr. de BEA s-ro Oktomvrijski en la granda salona „Videlina“ je la 16. dec. Ĉeestis precipe la junularo. Impreso bonega — tondraj aplaŭdoj. En la fino la direktoro de la gimnazio s-ro Popov kontraŭparolis есп. kaj rekomendis francan аŭ rusan. Tamen post malgranda diskuto kaj nova defendo de la sekr. Oktomvrijski kaj de la prez. de la loka societo, s-ro Iv. Konstantinov, la publiko estis definitive gajnita, inkluzive la direktoro, kiu konsentis viziti la bone aranĝitan есп. експозицион, evidente kontenta. Do, ree Saŭlo fariĝis Paŭlo. Posttagmeze kunveno de la esperantistoj kaj komuna fotografado. Granda entuziasmo. Kurso kun 50 p.

Plovdiv. Esp. kurso gvidata de s-ro Ivan Šivarov.

Ruse. Sukcesplena „Verda semajno“, bone diskonigita per la lokaj ĵurnaloj, per specialaj propagandiloj kaj per elmontrado de librotrezoroj ĉe la vitrujo de librejo Iv. Grozev. La societo „Espero“ festis sian 34-jaran ekziston, koincidanta kun la 75-jara datreveno de la naskiĝo de nia Majstro. Paroladis s-roj Josifov, Uzunov, Stanĉev kaj Georgiev. Esp. gramofondiskoj, kantoj, deklamoj, dancoj ĝis noktomezo. Komuna foto, kiu aperis ankaŭ en la Sofia „Ilustrita semajno“. Multaj libroj venditaj kaj kursoj malfermitaj.

Varna. La „Verda semajno“ daŭris de 22. ĝis 29. XII. 1934. Paroladis antaŭ la mikrofono de „Radio-Varna“ s-ro G. H. Dimov pri „Esp. kiel faktoro de klerigo kaj kulturo“. Loka ĵurnalo „Ĉerno More“ favore raportis. La ĵurnalo „Varnenska Poŝta“ aperis kun speciala esp. paĝo kaj artikolo pri „Esp. — la lingvo por ĉiuj“ de s-ro G. H. Sapunĝiev. La ĵurnalo „Ĉerno More“ aperigis leteron de esp. societo en Ljubljana pri la frata proksimiĝo inter „Ljubljana kaj Varna per esp.“ kaj artikolon de s-ino Zora Mladenova. Du kursoj.

Sozopol. Formiĝis societo. Gvidanto: s-ro Dimitar Vasilev. Baldaŭ kurso.

Strelĉa, Panagjursko. Nia fervora samideano Evstatij Ploŝtakov, instruisto, diligente propagandas, baldaŭ malfermos kurson kaj fondos societon.

Vratza. La 13. I. 35. okazis jarkunveno de la soc. „Sukceso“. Estis elektita jena estraro: Prez. R. K. Triĉkov, vicprez. I. A. Karlov, sekr.-kas. F-no E. Vaskova, bibl. A. Haralampiev, kontr. I. Vasilev, L. Jumerov kaj K. A. Mineva. Parolado kaj kursoj de s-ro Triĉkov je la nomo de la Popola Universitato ĉe la loka legejo „Razvitie“. Sur videbla stratloko speciala Murgazeto. La societo posedas riĉan bibliotekon kun pli ol 800 volumoj. La parolado de s-ro Kilian ne tre sukcesis.

Tirnov. En la malnova bulgara ĉefurbo kaj lulilo de esperantismo en Bulgarujo estas fondita *Universala per-esperanto muzeo*, sub la protektado de la urbestro. En tiu ĉi urbo ĉiam ekzistadis vigla esperantista vivo kaj la lingvo internacia estas tre multe parolata.

Nun la *gesamideanoj* en la tuta mondo estas petataj helpi en la kolektado de muzeaj objektoj. Rekompence ĉiu sendanto de objektoj (eĉ de malgrandaĵo) ricevos dankleteron — vidaĵon de la urbo. Por pli valoraj sendaĵoj oni donacas esperantajn librojn, bildojn, pentraĵojn aŭ aliaĵojn de bulgara popolarto. La „per-esperanto muzeo“ deziras korespondi kun fakuloj de muzea scienco kaj interŝanĝi objektojn kun aliaj muzeoj.

Adreso: Muzeja, Obŝtinata, Veliko-Tirnov (Bulgarujo).

(La estimataj redakcioj estas petataj represi ĉu-supran komunikaĵon).

— La centra-komitatano s-ro Petar Mitkov dum sia vojaĝo en decembro vizitis la urbojn Varna, Tirnov, Stara-Zagora kaj Plovdiv. Tie li renkontiĝis kun multaj samideanoj, ĉeestis kursojn, entuziasmiĝis kaj entuziasmigis. En la lasta urbo, la societa prezidanto nia malnova samideano s-ro P. Stoev, mem iris ĉe la samideanoj por kolekti la abonojn por B. E. kaj kotizojn por B. E. A. Imitinde!

— La bulgara kuracisto D-ro Nik. S. Kirĉev, kiu antaŭ 35 jaroj forlasis Bulgarujon, traveturis Azion, kaj depost 12 j. loĝas en Honolulu — Havai, eklernis esp. En sia 69 jara aĝo li sentas sin ankoraŭ knabo sur la paradizaj insuloj, kie estas eterna printempo.

Скжпете ни времето, — времето е пари, а пари нѣмаме!

Есперанто е шедьоврътъ на логиката и простотата.

Двама хора отъ различни народности не сж никакъ човѣци по отношение на единъ къмъ другъ — тѣ не се разбиратъ.

(Плиний, *Ест. Ист.* VII, 1)

Bibliografio

(Duoble ricevitaj esperantaĵoj ni recenzas, unuoble — ni nur mencias)

Стандардизация научно-технических понятий, обозначений и терминов (Normigo de science teknikaj konceptoj, terminoj kaj simboloj) en rusa lingvo de nia samideano E. K. Drazen, ŝtata eldonejo, Moskva 1934, II eldono, 108 paĝoj, prezo 2 rubloj.

Katalogo de la esp.-gazetaro. Kompilis kaj komentariis D-ro Jozefo Takács, reviziis kaj kompletigis Paŭlo Tarnow. Eldonis Ant. Prazák, Jablonne N. Orl., Ĉeĥoslovakujo, 1934, 168 paĝoj, prezo 15 ĉ. kr. + 10% sendkosto.

Agrablaj horoj por junaj esperantistoj, 8-paĝa, eld. de la Tutmonda asocio de geinstruistoj esp., Vendam, Nederl., Prezo 0.85 ned. guld por. 100 ekz. Aperos tuta serio de tiuj malgrandaj kaj malkaraj broŝuroj aldoneblaj en gazetoj kiel rubriko por infanoj.

Freude durch Esperanto!, de Hugo Steiner, eld. Das Kleine Volksblatt, Wien VII, 96 paĝoj, prezo 2 ŝil. + 32 groŝ. afranko.

Tiu ĉi germanlingva lernolibro en 16 lecionoj kun traduko estas destinita por kursoj kaj memlernantoj de esp. La nomo de l'aŭtoro, prez. de Aŭstria Esp. Asocio kaj fondinto de Intern. Esp. Muzeo, garantias pri ĝia boneco.

Esperanto — hispan-amerika vortareto, de Jesus Amaya, Editorial Lumen. Ap. 59, Meksiko, paĝ. 112, Prezo 2 fr. fr. aŭ 2 responkuponoj.

Nova Turan, specimena folio de la turan-devenaj popoloj. Jarabono: 2 sv. fr., adreso: Debrecen, Vigkedvű 4, Magyarorszag (Hungarujo).

Konatiĝu kun mi! luksa 44-paĝa kolorilustrita libro-katalogo de la eldonejo „Literatura Mondo“ — Budapest, Hungarujo. — Katalogo de Germana Esperanto-librejo, Leipzig C1, Hospitalstr. 2 III, Germanujo.

Esperanto-korelativoj, surkartona eldonaĵo de R. K. Tričkov, Vratza, Bulg., prezo 5 levoj.

Accent, the true Secret of expression in piano playing, 16-paĝa anglalingva broŝuro pri la sekreto en pian-ludado, de Fenton Sheffield Stancliff, Ohio, Usono.

Na planinata (sur la montaro), fabelo de L. Lulčev, 167 paĝ., prezo 20 levoj, eld. St. Atanasov, Sofia, 1935.

Momakat's laternata (la junulo kun la gurdo) — versaĵaro de Atanas Duškov, 48 pĝ., prezo 15 levoj, eld. de D. Ĉilingirov, bul. Dondukov, Sofia, 1935.

Vazpitanieto v novata darĵava (la eduko en la nova ŝtato), de Marin T. Vlajkov, kun antaŭparolo de D-ro St. Ĉakarov, Sofia 1935, pĝ. 87, prezo 30 levoj.

Polska Gramatika (Pola gramatiko) de prof. Bojan Penev, postmorta eldonaĵo sub la redakto de Prof. D-ro St. Mladenov, Universitata Biblioteko № 141, Sofia Ĉekortega presejo, 1934, pĝ. 240, prezo 100 levoj.

Grandformata eldonaĵo, bonega preso, luksa papero. Enhavo: Enkonduko, Fonetiko, Partoj de l'parolo, Ortografio, Vortaro de polaj vortoj alisencaj de la similaj bulgaraj kaj rusaj vortoj, Pola antologio.

Malgranda estas nia gazeto por laŭdi tiun grandan verkon kiel ĝi plene meritas.

I. H. K.

Ricevitaj gazetoj: Aganto, Argentina Esp., Belga Esp., Bulteno de Argentino, Bulteno de I. S. A. E, Bulteno de Ĉ. A. E., Esperanto, de UEA. Espero Katolika, Fluganta Skribilo, Franca Esp., Heroldo de Esp., Homo kaj Mondo, Hispana Gaz. Esp., Informilo de G. E. L. en Ĉeĥosl., Intern. Medicina Revuo, Intern. Pedagogia Revuo, Intern. Polica Revuo, Kantona Esp. Gazeto, Komunikoj de Intern. Transp. Fed., La Interligilo del P. T. T., La Espero, La

Lernanto, La Lumturo de Esp., La Militrezistanto, La Mondo, Ondo de Daugava, La Revuo Orienta, La Suda Stelo, Legu...! L' Esp. Sisteronais, Literatura Mondo, Lingvo Internacia, Lingvo-Libro, Le Sténographe illustré, Nia gazeto, Nia Stelo, Norvega Esp., Nova Horizonte, Pola Esp., Renobasion, Sennaciulo, Sur posteno, Sveda Lab. Esp., Tempo, Turismi Teataja, Verda Mondo, Verda Revuo, Братство, Добро здраве, Здравъ животъ, В.-Търн. трибуна, Тракиецъ, Желъзн. подемъ, Земя, Страници за всички, Фаръ, Bulgarian-Japanese Review.

Oni laŭdas

(Opinioj pri „B. E.“)

„Por via afabla alsendo de „B. E.“ mi tre kore dankas vin. Mi legas ĝin kun multe da intereso . . . Cetere tre bona kaj interesa enhavo.

Tre kore via *D-ro Pierre Corret*,
Akademiano, Parizo

„ . . . Kun plej granda, intereso kaj plezuro mi legas „B. E.“, kaj pro ĝi mi estas tre dankema . . .“

S-ino *Marthe L. Petit—Dijon*

„B. E. mi ricevis, — tre bonega kaj enhavoriĉa estas. Gratulon . . .“

Iv. Valĉanov — Tirnovo

„ . . . Mi estas nova esperantisto kaj abonato de B. E. — vere bela kaj leginda gazeto . . .“

Krestjo Dinev — Stralĝa

— „Heroldo de Esp.“ de la 4. nov. 1934 reprenis el „Bulg. Esp.“ la versaĵon „Insul' Esperanto“ kaj konkludas jene:

„Ni ne dubas, ke en estonteco tre multaj samideanoj el ĉiuj mondpartoj foje ankaŭ trovos la vojon al tiu feliĉa insulo sen reĝo, dikto kaj leĝo — kie nur regas Esperanto, amo kaj paco...“

Ĝustatempe helpite estas duoble helpite!

— En la kaso asocia regas aero dial

Nia leterkesto

(Ĉirkaŭ la paperkorbo)

P. G. P.—La senditaj versaĵoj taŭgas por „Frateco“.

D-ro St. K. — Via fabelo ne taŭgas por nia organo. Sendu ion de moderna bulg. verkisto.

S-ino R. Ĉ. — Bonvolu alifoje mem esperantigi viajn poeziaĵojn.

At. V. — Viaj versaĵoj neaprobitaj — lamas ankaŭ gramatike.

Iv. K. — „Kiel mi fariĝis esperantisto“ atendas sian vicon.

St. M. — Gratulon pro via bonstila „Letero“ — ĝi baldaŭ vidos la blankan mondon.

Al. K. — Tro longaj estas la flugiloj de via „Hirundo“ por niaj kolonoj.

N. M. K. — Ni ekzamenos vian proponon pri „Porinfana rubriko“. Dankon!

Al ĉiuj: skribu legeble, en esp. kaj nur sur unu paĝo de l' papero. Ŝatu niajn tempon kaj okulojn!

— Всички запитвания отъ частенъ интересъ, които съидейниците отправятъ до централния комитетъ или до редакцията на „Bulgara Esperantisto“, да бждатъ придружавани съ марка или карта за отговоръ.

— Въ брой 1—2 на „Bulg. Esp.“ въ отчета за работата на конгреса въ Орѣхово е погрѣшно съобщено, че се задължава съ сумата 425 лв. съидейникътъ Стефанъ Радевъ, вмѣсто esp. ц-во „Solidareco“ въ Русе.

Молимъ съид. Стефанъ Радевъ да ни извини за горното опущение.

Поправка — Korektu en № 3—4, paĝo 3, kolono 1, linio 16: ni ne estas perfiditaj.

Пишете четливо, сбито и само на една страница!

Платете си абонамента — 20 лева — или върнете книжкитѣ!

Станете членъ, подкрепете организацията, вноската е само 20 лева годишно!

Helpu la asocion. Vi ĝuos honoron, rabaton kaj aliajn favorojn

Kiĉ estas via briko? Sendu ĝin tuj. Nia domo — B. E. A. — bezonegas ĝin!

Demando. Kiu tenas la arĥivon de BEA por pasintaj jaroj kaj ĉe kiu troviĝas la originala letero-saluto de D-ro Zamenhof al la bulgara esperantistaro?

Varbo-konkurso. Kiu ĝis la ortodoksa Pasko varbos almenaŭ 3 novajn membro-abonantojn, tiu ricevos premion de valoraj esp. libroj.

Tuj ekagu — varbu!

Nia redaktoro S-ro Krestanov tutkore dankas ĉiujn gesamideanojn, kiuj lin salutis okaze de l'novjaro. Centoble li reciprokas al ili la bondezirojn.

La sama profitas la okazon adiaŭi la karajn delegantojn: pro troa okupateco kaj nova posteno, tiu ĉi n-ro de „B. E.“ estas eble la lasta de li redaktita.

Българска литература, техническа литература, есперантска литература предлага книжарница **Ив. Грозевъ — Русе.**

Най-много търсенитѣ по цѣлия свѣтъ книги. Това сж книгитѣ на Джекъ Лондонъ. Защото той е най-ярката звезда на американския небосводъ — описва и човѣшката душа и общественитѣ отношения.

Който изпрати на следния адресъ: сп. „Страници за всички“ — София 100 лв. по чекова смѣтка № 782, или съ пощенски записъ, или препорѣчано писмо, ще получи веднага и препорѣчано първитѣ отпечатани вече 4 тома отъ пълното събрание на съчиненията

— Часовникарскиятъ магазинъ **Димитъръ Дръндаровъ** отъ ул. Арда № 1 се премѣсти на ул. Мария Луиза № 7, между Нишка и Трапезица, София.

Presejo „KULTURA“ Sofia

DEZIRAS KORESPONDI:

1. S-ro Angel Iv. Todorov, ŝuisto, v. Peruŝtica, Plovdivsko, Bulgarujo.

2. S-ro Dimitar K. Stoev, v. Velkovo, Bojansko, Bulgarujo.

S-ro Kr. Gajdarov, student-matematik, str. Bogomil 5, Sofia VI, Bulgarujo.

S-ro Petter Auerdobe, Kongsberg Norvegujo.

Bulgarinoj inteligentaj, simpatiaj, bonaj domomastroj, dothavaj, deziras korespondi kun inteligentaj bulgaroj aŭ eksterlandanoj — Adreso: Geedzig-oficejo „Carevec“, Alabinska 53, Sofia, Bulgarujo.

Senpage sendas esp. librojn kontraŭ aer-aŭ jubileaj poŝtmarkoj, laŭ Yvert 1935, kalkulante 5 fr. = 1 kĉ. Sendu rekomendite al Hermann Röllig, Gablonz a. N., Wassergasse 7-a, Ĉeĥoslovakujo.

Mi interŝanĝas poŝtmarkojn de la tuta mondo, pecon por peco, aŭ laŭ katalogoj Michel, Yvert. Ankaŭ pli grandan kvanton mi povas ŝanĝi, kvanton por kvanto, aŭ laŭ interkonsento.

Mi aĉetas ankaŭ poŝtmarkojn en ĉiu kvanto, precipe flugpoŝtajn kaj novaĵojn. Ĉiun demandon aŭ proponon mi certe tuj respondas.

V. Zámostny, Praha XI, Palackého tr. 28., Ĉeĥoslovakujo.

ЕСПЕРАНТО — граматика, два речника, читанка — повече отъ 550 страници само за 105 лв. препорѣчано: **Ив. Х. Кръстановъ, б. Септемврий, 2, София.**



При сжщия:

Уроци — френски, нѣмски, италиански, английски, есперанто, по единично и групово, съ учебници по 25 лв.

Есп. значки — insignoj по 20 и 25 лева (+ 2 лв. за препорѣжа).

Oomoto Internacia, monata organo de altspirita movado kaj de universala homama asocio. Ĉefredaktoro Nišimura, red. Major. Jarabono 5 sv. fr. aŭ egalvaloro. Oomoto Centra Oficejo, Kameoka Kioto hu, Japanujo.